Kiam oni fondis Svedan Esperantistan Societon en 1906 (posta nomo Sveda Esperanto-Federacio), la sveda esperanto-movado jam povis kalkuli pri dek kvin jaroj da organizita agado. Gravan rolon ludis dum tiuj jaroj Valdemar Langlet (1872 - 1960), tial estis nature, ke li fariĝis prezidanto de la nova landa asocio.

En 1906 Langlet estis 34-jara, sed inter esperantistoj oni kalkulis lin al la veteranoj. En 1891, 19-jara, li kunfondis la duan esperanto-societon en la mondo, tiun de Uppsala, kies prezidanto li estis inter 1892 kaj 1899. En 1895 li fondis kaj ekredaktis, kune kun Vladimir Gernet el Odeso, la revuon **Lingvo Internacia**, ankaŭ dua en la mondo.

Siajn du edzinojn li trovis en la esperanto-mondo: en 1899 Signe Blomberg el Turku kaj en 1925 Nina Borovko el Moskvo.

Valdemar Langlet multe vojaĝis. Sian unuan vojaĝon al Ruslando en 1895 li priskribis sur la paĝoj de **Lingvo Internacia**. Pri la dua vojaĝo, kiam li vizitis i.a. Leon Tolstoj en Jasnaja Poljana, aperis libro en la sveda (*Till häst genom Ryssland*, Fr. Skoglunds förlag, Stockholm 1898, 423 p.). Aliaj libroj pri aliaj vojaĝoj sekvis.

Plurfoje li vojaĝis en Hungario, lando, kiun li ekamis. Li restis tie en 1932 kune kun sia Nina, kaj ekinstruis la svedan lingvon ĉe la budapeŝta universitato. En 1945, post la fino de la dua mondmilito, ili reiris al Svedio.

Dum 1944 kaj 1945 li estis ĉefdelegito de la Sveda Ruĝa Kruco en Hungario. Per neortodoksaj metodoj li dum tiuj jaroj helpis al multaj hungaroj travivi la militon kaj savis la vivon de dekmiloj da ili, kiuj riskis perei en naziaj koncentrejoj.

Valdemar Langlet per sia praktika agado helpis al la esperanto- movado, kiam ĝi bezonis helpon kaj kiam ĝi bezonis lertan gvidadon. Tial Sveda Esperanto-Federacio honore al sia unua prezidanto kreis **Rondon Langlet**, rondon de subtenantoj de la laboro por la internacia lingvo esperanto.

Membroj de **Rondo Langlet** donas al sia banko aŭ poŝtĝiro la taskon sendi al la poŝtĝira konto de SEF la saman sumon ĉiun monaton. Tio estas nomata "aŭtoĝiro" kaj funkcias por faciligi rutinajn pagojn. Ni preparis specialan formularon por tio; vi bezonas plenigi ĝin nur unu fojon kaj sendi al SEF.

La sumo, kiun oni pagas, estas kompreneble libervola, de cent kronoj ĝis - nu, ne ekzistas supra limo. Ĉiu krono estos uzata por esperanto: eldonado de la membrogazeto *La Espero*, aktiva retejo, partopreno en ekspozicioj kaj konferencoj, informado al interesitoj, lupago de Esperanto-Centro en Stokholmo, ankaŭ grava mozaikero.

Valdemar Langlet agis laŭ siaj eblecoj antaŭ 100 jaroj. Ni daŭrigas lian laboron por Esperanto kun la sama entuziasmo fariĝante membroj de la rondo, kiu havas lian nomon.

RONDO LANGLET

DE SVEDA ESPERANTO-FEDERACIO

SEF 26 marto 2001